# *Kuba parlamento rifuzas inkluzivigon de Kubo en liston de landoj subtenantaj terorismon*



Havano, jan 12 (RHK) La komisiono de internaciaj rilatoj de la nacia asembleo de la popola povo de Kubo rifuzas kaj kondamnas la cinikan inkluzivigon de nia lando en liston unuflankan,  kiu pritaksas nin kiel ?tato subtenanta terorismon.

Ili malhavas a?toritaton a? mandaton internacian, des malpli moralan por tion fari, kiam envero ili impulsas, subtenas kaj financas terorismon, kaj samtempe protektas siajn agantojn kaj murdistojn, kiuj post fari siajn krima?ojn, libere promenas en la usona teritorio.

La kubaj parlamentanoj asertas ke temas pri unu el lastaj batoj de la administracio de Trump kontra? Kubo por pli intensigi sian ekonomian militon kaj fermi la sie?on genocidan per kiu ili klopodas strangoli la insulan popolon.

La kubaj parlamentanoj denuncas anta? la mondaj homologoj tiun ?i novan agreson. La administracio Trump, ?iaj agloj kaj la mafio kuba-usona fiaskis.

La patrolando de Martí kaj de Fidel, libera, suverena, sendependa, kontra?imperiisma kaj socialista ne estos venkita.

La parlamenta deklaro emfazas ke Kubo celebras sian 62-an datrevenon de bataloj kaj venkoj kun la solidareco de siaj fratoj tra la mondo, per la forto, firmeco kaj revolucia pasio de la unua tago.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/244431-kuba-parlamento-rifuzas-inkluzivigon-de-kubo-en-liston-de-landoj-subtenantaj-terorismon

**Radio Habana Cuba**